

Larmoj de Basyoo

Teruhiro Sasaki

Basyoo ofte ploras. Onidire, japanoj ne ploras publike antaŭ la aliaj. Malgraŭ tio, ĉi tiu granda poeto ne kaŝas sin plorantan ĉie ajn. Tiu mirinda fakto instigas min esplori la kaŭzon de larmoj ĉe Matuo Basyoo. Je kio, kial, kiam kaj kiel li estas emociata, tio estas la temo de ĉi tiu eseo, ĉar larmo ekfluas rezulte de forta emocio. Eblas scii, pri kio li forte interesiĝis en sia verkado de poezio.

1. AMO AL LA PATRINO

Basyoo plurfoje ploras, sopirante sian mortintan patrinon. Li skribis en “La Veterbata Skeleto [Nozarasi-kikou]” jene.

Mi revenis hejmen al naskiĝloko je la komenco de naŭa monato. Forvelkis pro prujno kaj nun tute ne restas la taglilio, plantita apud norda halo, kie loĝis patrino. Ĉio ŝanĝiĝis de antaŭo, flankaj hartuoj de miaj gefratoj blankiĝis kaj ĉe la brovoj sulkiĝis. Ni nur diris: “Estu vivaj”. Kaj ne povis diri plu. Frato elpakis saketon de amuleto kaj diris: “Rigardu blankharojn de panjo! Ĉe vi ankaŭ maljunuliĝis brovoj, kiel la epizodo de Urasima, kiu malfermis pandoran skatolon kaj tuj maljunuliĝis.” Ni ploradis dume.

Aŭtuna prujno,
Se mi prenis per manoj,
Ĝi malaperus,
Pro varmegaj larmoj

[Te ni toraba kien namida zo atuki aki no simo] [2:15]

Basyoo restigis nur unu hajkon pri sia naskiĝloko en “La Dorsosaka Letero [Oi no kobumi]”, sed en alia noto “La Jarfina donaco [Seibo]” li alligas profundan senton al la hajko.

Se gepatroj estus vivaj.... Mi, sopirante pri lia antaŭa amo, nur pensas multe kaj versis jene.

Ha, naskiĝloko!
Mi ploras je umbilika ŝnuro
En la jarfino.

[Hurusato ya heso no o ni naku tosi no kure] [3:152]

Basyoo amas profunde siajn gepatrojn, tial do li tre malĝojas pri la trista moro de “Forĵetado de maljunuloj [Obasute]”. Kvankam li ne publikigis en “La Vojaĝo al Sarasina [Sarasina-kikou]” sian indignon, tamen en alia noto “La vortoj pri la luno sur la monto Obasute en Sarasina [Sarasina ubasute tuki no ben]” li skribis jene.

La monto Obasute situas sude de la vilaĝo Yahata je ĉirkaŭ unu leŭgo, kaj kuŝas de okcidento al sudo ne tre alte sen krudaj rokoj. La monto mem havas aspekton, nur profunde tristan. Mi bone komprenis tiun version, en kiu estas dirita “Nekonsolebla mia koro” [tio estas la frazo de la filo, forĵetanta sian maljunan patrinon laŭ admono de sia edzino]. Al mi estas malĝoje. Pensante, kial oni forĵetis maljunajn homojn, mi ploris kun larmoj, falantaj senĉese, kaj versis sekve.

Vizio –

Ploranta solece avino,

La amikino de luno.

[Omokage ya oba hitori naku tuki no tomo] [2:119]

2. SINTENO AL LA FORLASITA BEBO

Sed malvarma ŝajnas lia sinteno al la forĵetita bebo, kiun li vidis apud la rivero. Li skribis jene.

Laŭirante la riveron Huzigawa, mi trovis unu bebon ege ploranta, kiu, verŝajne, estas ĉirkaŭ tria jaraĝa kaj forlasita. Ĝiaj gepatroj ne povas elteni ondon de la mondo, kiel torenton de ĉi rivero. Ĝia vivo, kvazaŭ roso, daŭrus efemera, do ili, ŝajne, forlasis ĝin. Blovas aŭtuna vento ĉe la eta floro de lespedezo, kiu falus ĉi nokte aŭ velkus morgaŭ. Mi preterpasis lin, ĵetinte al li pecon de manĝaĵo el mia maniko.

Aŭskultanto simion ploranta!

Al forlasita bebo

Kia aŭtuna vento?

[Saru wo kiku hito sutego ni aki no kaze ikani]

Kio okazis al ci? Ci estas malamita de patro? Aŭ malzorgita de patrino? Cia patro ne malamas cin kaj patrino ne malzorgas cin. Tio ĉi estas nur ĉiela ordono. Ploru pro cia denaska malbona sorto. [2:12]

Kiel ni devas kompreni lian ĉi tiun sintenon al la povra bebo? Pri tio ni pensas pli profunde. Eblas, ke li ege plorus, tamen ne skribis en la publikita libro. Eblas, ke li ne havus tro amon al beboj pli, ol al gepatroj. Al ni estas tre interese, ke Basyoo demandas al la granda ĉina poeto Tufu, al “la aŭskultanto de simia ploro”, kion fari en tiu ĉi situacio. Basyoo mem nur povas diri al la forlasita bebo: “Tio ĉi estas nur ĉiela ordono”.

Sed Sodoo, kiu alligis epiligon al “La Veterbata Skeleto”, konsideras, ke Basyoo ploregis pli ol trifoja plorado je la mizera bebo. Sodoo skribis jene.

Ĉu la vento, blovanta tra skeleto, havas en sino senton de cent leŭgoj per unu paŝo? Ĉu la forlasita bebo ĉe la bordo de la Huzigawa devus plori ne pro la gepatroj, sed pro la ĉielo? La ploranta bebo estas sola, sed li vidas kelke da peco de kompatato ĉe irantoj preter

si. Basyoo aldonas al la aŭskultanto de simio sian kordoloron, kaj ĉi-foja larmo de Basyoo inundas pli ol tio de trifoja plorado.

[La postskribo de Sodo al eldono de Zyokusi, 2:43]

Kvankam Sodo konjektis tiele, tamen Basyoo mem ne skribis pri sia larmo al la bebo. Basyoo mem profunde sentas, ke “vantaĵo de vantaĵoj,... ĉio estas vantaĵo”.

3. MORTOJ DE DISCIPLOJ KAJ AMIKOJ

Basyoo ofte ploradis pri la morto de siaj amikoj aŭ instruistoj. Tre fama sceno de plorado estas versita de Basyoo en “La Streta Vojo al Fora Interno [Oku no hosomiti]” okaze de la morto de Issyou.

Issyou, la hajkisto, kies bonan reputacion je poezia vojo mi aŭdis sufiĉe, tial do li estis konata en la mondo, sed li mortis ankoraŭ juna en lasta vintro. Lia pli maljuna frato okazigis kunsidon de hajku, kiel la ceremonio por la animo de mortinto, tiam mi versis:

Ho, ve, la tombo moviĝu,

Mia voĉo de ploro

Estas aŭtuna vento

[Tuka mo ugoke waga naku koe wa aki no kaze] [1:51]

Ĉi tie la esprimo de malĝojo ŝajnas tro forta, ke oni legus ne vojaĝnoton, sed spektus tragedion en teatro. Ĝenerale Basyoo ne inhibicias eksplodon de sia emocio okaze de mortoj de disĉiploj aŭ instruistoj. Kiam unu el liaj Zen-instruistoj mortis, Basyoo skribis pri sia malĝojo jene.

Li informis min, ke ĉi-jare en la komenco de unua monato, [sub bonodoro de umefloroj,] mortis sankta Daiten de la templo Engaku-zi. Mi, vere, sentis min aŭdanta pri tio kvazaŭ en sonĝo kaj el la vojo mi sendis al s-ro Kikaku vortojn.

Sopirante je la umefloro,

Mi klinas nun kapon antaŭ deŭzio,

Kun larmoj

[Ume koite unohana ogamu namida kana]

Al s-ro Tokoku,

Al blanka papavo,

Papilio detiris sian flugilon,

Kiel postlasitan memoraĵon.

[Siragesi ni hane mogu tyou no katami kana] [2:23]

Basyoo sendis al sia disĉiplo, Tokoku, pri sia tristeco je la morto de la bonzo Daiten. Tokoku estas unu el plej amataj disĉiploj de Basyoo. Li mortis tre juna. En "La Taglibro en Saga [Saganikki]" Basyoo ege ploras, sopirante je Tokoku.

Dudek oka tago

En sonĝo ekdirante pri Tokoku, mi ploregis kun larmoj, kaj vekigis.

Kiam ajn interrilatas spiritoj, oni sonĝas. ... Mia sonĝo ne estas sonĝo de sanktulo-virtulo. Tutan tagon mi inklinas al fantazio, iluzio kaj alieneco, kaj nokta sonĝo ankaŭ tia. Mi ja sonĝis pri ĉi tiu homo, tio estas, tiel nomata, *nenmu*, la sonĝo de arda deziro. Profunde min estimante, li adore venis al mi eĉ al mia hejmloko Iga. Nokte ni kune dormis, kaj dividis malfacilan vojaĝon, helpante unu al alia. Li ĉiam sekvis min dum ĉirkaŭ cent tagoj kvazaŭ mia ombro. Iam ni amuziĝadis reciproke, iam kunĉagrenadis. Lia sento penetris ĝis la fundo de mia koro, tiel do mi neniam forgesas lin. Vekiĝinte, mi ankoraŭ larmegis inunde. [2:134]

Tokoku estis ekzilita al la duoninsulo Irako, en la vilaĝon Houmi, kiun Basyoo kune kun Etuzin vizitis por konsoli lin. Kaj poste li akompanis Basyoon dum la vojaĝo de "La Surdorsa Letero [Oi no kobumi]". Basyoo profunde amis siajn disĉiplojn, ne nur Tokoku, sed ankaŭ ĉiujn aliajn. Amataj de Basyoo disĉiploj fondis skolon de Basyoo, tiel nomata « Syouhuu ». Ili ne forgesis larmojn de Basyoo, kiu ploradis por disĉiploj.

4. DIVERSAJ HISTORIAJ PERSONOJ

Ofte instigas larmojn de Basyoo ankaŭ la famaj historiaj figuroj. Li estis kortuŝita de la sankta ĉina bonzo, blindulo, kiu disvastigis Budhismon en Japanio spite ĉion malfacilaĵon.

Kiam alvenis Japanion la sankta bonzo Ganzin [688-763], la fondinto de la templo Syoudaizi [Templo invita el Tang-Ĉinio] post pli ol 70-fojaj malsukcesaj ŝipvojaĝoj, sala vento enblovinta en liajn okulojn fine blindigis lin. Adorante lian sakralan statuon, mi versis:

Per juna folio

Larmojn de viaj okuloj

Mi volus forviŝi.

[Wakaba site onme no sizuku nuguwabaya] [2:85]

Basyoo kompatis la tragike mortintojn en bataloj. Li vidis efemerecon en venko kaj malvenko, tial ke, hieraŭa venkinto ekestas hodiaŭ venkita, kaj hodiaŭa venkinto fariĝos malvenkinto tuj morgaŭ. Unu el celoj de vojaĝo ĉe Basyoo estas la serĉado de la historia alternado. "La

Dorsosaka Letero” estas finita je la disfalo de dinastio de la klano Heike.

mi suben rigardas, tiam sub la okuloj videblas la ruino de imperiestra palaco en la valo Itinotani. Kvazaŭ kaoso en tiu epoko kaj tiama tumulto prezentigis al mi en koro, antaŭ miaj okuloj kolektiĝis tiaj diversaj vizioj, kiel haste azilas en la reĝan ŝipon kaj la bonzino de dua ranga, edzino de Kiyomori, portanta sur siaj brakoj la junan mikadeton, kaj s-ino Tokuko, dua filino de Kiyomori, kun siaj piedoj implikiĝantaj per trenajo, kaj kiel diversrangaj korteganinoj kaj servistinoj enĵetas en ŝipon diversajn kuirilojn kaj muzikilojn (liutojn, kotoojn ktp.) kovritajn per hutonoj aŭ peplomoj. Ŝutitaj reĝaj manĝaĵoj fariĝas nutraĵoj por fiŝoj, kaj malordiĝintaj galanterioj – ruboj por fiŝistoj. Miljara tristeco restas sur ĉi marbordo, eĉ sono de ondoj plenas de spleno. [2:89-90]

En citata loko de « Oi no Kobumi » Basyoo ne skribis, ke li ploris. Sed en la letero li konfesis, ke li ploregis antaŭ la tombo de Atumori, juna generalo de klano Heike, mortigita en la batalo.

Mi imagas tiaman tempon, kiam la imperiestra palaco situis en Ueno de Suma, kaj kiel la bonzino de dua ranga, edzino de Kiyomori, enŝipiĝas, portante la etan mikadon sur sia maniko, kaj oni haste alportis trezoran glavon kaj tronon en la ŝipon, aŭ korteganinoj de pli malalta rango, portante siajn galanteriujojn, faligante kombojn, stumblas je siaj skarlataj jupoj kaj faladas surventre, do al mi estis triste prezenti ĉion ĉi vizion, kaj aparte mi ne povis ne plori ĉe la ŝtona tombo de Atumori.

[Letero de Basyoo al Sousiti en 25-a de 4-a monato, 1-a jaro de Genroku 2:95-96]

En la verko ”La Streta Vojo Al Fora Interno [Oku no hosomiti]” Basyoo vizitis la lokon de la morto de generalo Minamoto no Yositone, kiu pereigis la klanon Heike. Post la milito Yositone tuj estis forpelita kaj mortigota de sia frato, Yoritomo, kiu fondis novan registaron de Kamakura. Yositone kun siaj vasaloj fuĝis al Oku, turnis sin kun peto de azilo al la familio de Huziwaru.

La gloro dum tri generacioj lumis nur kvazaŭ en daŭro de unu dormo. La ruino de granda perdo staras je unu leŭgo antaŭ la kastelo. La domo de Hidehira tute malaperis kaj ŝanĝiĝis en kampon. Restas nur ruino de la monteto de ora koko Kinkeizan, konstruita en la formo de la monto Huzi. Mi supreniris al Takadati, al la ruino de la alta fortreso de Yositone, de kie videblas Kitakamigawa, la granda rivero, fluanta el norda provinco de Nambu. La flankrivero Koromogawa fluas ĉirkaŭ la kastelo Izumi kaj ĵetas sin en la granda rivero sub Takadati. La ruino de la kastelo de Yasuhira estas sur la alia bordo de Koromo Bariero. Tio, ŝaine, gardis enirejon de Nambu kontraŭ Ainuo. Elitaj fideluloj de Yositone kolektiĝis en ĉi tiu kastelo por sin lumigi en la lasta momento, kaj ĉio ŝanĝiĝis en herbaron. “Ŝtato pereis, tamen restas montoj kaj riveroj; la ruino de kastelo estas en printempo amase kovrita de herboj kaj arboj”. Demetinte ĉapelon sur herbo, mi ploris kun larmoj tiom longe, kiom horoj pasis.

Somera herbo –
La sekvo de sonĝo
Por batalintoj

[Natu kusa ya tuwamono domo ga yume no ato] [1:36-37]

Bravuloj-batalantoj malaperis. Sed restas longe la poetoj, kiel Dufu, Saigyoo, Basyoo, k.a. Efemera estas la politiko, porĉiama estas la poezio.

Basyoo direktas sian atenton eĉ al malfeliĉaj ekzilitoj. Rilate al tio, survoje laŭ Niigata li skribis jene.

Ho, ĉar ĉi tiu insulo [Sado] estas riĉa je multe da oro, trezoro por la tuta mondo, tial do ĝi devus esti senlima gratula insulo. Sed tien estas ekzilitaj grandaj krimuloj kaj ribelantoj kontraŭ imperiestro, kaj en la mondo nur terura nomo aŭdeblas, tio estas tre domaĝe al mi. Malfermiginte fenestron, mi iel volus dume konsoli mian splenon de vojaĝo. La suno jam subiris maron, la luno ne tiel helas, la lakta vojo pendas laŭ duona ĉielo, steloj klare brilegas. De sur la maro, demalproksime, ĉiam alportiĝas sono de ondoj, kvazaŭ oni skrapus spiriton kaj ŝirus al mi intestojn, kaj mi sentas min ekstreme malĝoja, en lito mi ĝene turnadas min, mia maniko de nigra vesto trempiĝas de larmoj ial senkaŭze.

Jen furioza maro,
Al la insulo Sado kuŝas
Ĉielrivera Galaksio

[Araumi ya Sado ni yoko tau amanogawa] [3:168]

Ĉi tiu spleno ĉe Basyoo estas egala al la malĝojo ĉe rusa verkisto, Ĉeĥov, kiu veturis al la insulo Saĥalino kaj lamentis pri la sorto de Patrolando. Kvankam Saĥalino estus riĉega insulo, tamen ĝi ŝanĝiĝis en la malliberejon. Stranga, sed vera estas la fakto - kie estas multe da oro, tie troviĝas multe da mizeroj. Ĉi tie ankaŭ estas vantaĵo de vantaĵoj. Grandaj verkistoj suferadis je la kontraŭdiro. La fama hajko, alligita ĉi tie, havas tre profundan signifon en ĉiuj vortoj: “freneza maro [araumi]”, “la insulo Sado”, “Ĉielrivera Galaksio”.

ANSTATAŬ LA FINO

Se esprimi la karakteron de Basyoo eblas per unu vorto – tio edtas “kompato”. Ĉie en liaj versoj kuŝas la kompato. Eĉ birdoj kaj fiŝoj ploras kun larmoj.

Mi elŝipiĝis ĉe la loko Senzyu, mi verŝis larmojn de disiĝo sur la efemera mondo, kiam mia koro pleniĝis de la penso pri 3000 leŭgoj (ĉirkaŭ 12000 km) de vojo kuŝanta antaŭ

mi.

Trapasas printempo,

Krias birdoj,

Larmoj en la okuloj ĉe fiŝoj.

[Yuku haru ya tori naki, uo no me wa namida]

Per ĉi tiu verso komencis mia vojaĝlibro, sed mia paŝo ne tuj iras. Karaj homoj, starante vice sur la vojo, volis forvidi min probable dum mia dorso videblas. [1:12-13]

Kvazaŭ en la bildo de mortinta Budho, ĉirkaŭ la poeto ploras ĉiuj, ne nur homoj, sed ankaŭ birdoj kaj fiŝoj. Basyoo ploras pro la efemereco, pro la vantaĵo de la mondo. Lin larmigis la vanteco de homa vivo, la sorto de fortuloj kaj malfortuloj. Eĉ natura pejzaĝo ne povas esti senŝanĝebla. Tiu bela pejzaĝo de Kisagata nun malaperis. Ĉio estas vantaĵo escepte de poezio. Ĉiuj entreprenoj estas vantaj krome versoj de Tufu, Saigyo kaj aliaj poetoj. Pereis klanoj de Hejke kaj Genzi, sed ne pereas la hajko de Basyoo, kiu kantis pri somera herbo. Basyoo ploradis kun larmoj, sentante la vanton tiel same, kiel la Predikanto en La Malnova Testamento:

... ne scias la homo sian sorton; kiel fiŝoj, kaptitaj en pereigan reton, kaj kiel birdoj, implikiĝintaj en kaptilon, tiel kaptiĝas la homoj en tempo malbona, kiam ĝi atakas ilin neatendite. [La Predikanto 9:12]

Ĉiuj fiŝoj mortas, sed fiŝo kun “larmoj en la okuloj”, versita de Basyoo, ne malaperos por eterne.

BIBLIOGRAFIO 1. 松尾芭蕉、新訂『おくのほそ道』（穎原退蔵・尾形侑訳注）。岩波文庫、1983年 2. 『芭蕉紀行文集』（中村俊定校注）。岩波文庫、1990年 3. 『芭蕉文集』（日本古典文学大系46）。岩波書店、1959年